

Pri la recenza arto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 469, 1981.04.09 & 11

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Kiu iom legemas, tiu nepre rimarkas, ke vigliĝas la eldonritmo de la esperantistoj. Prizorgante kun mia edzino la akiron de novaĵoj por la libro-servo de Kultura Centro Esperantista, ni konstatas, ke fariĝas malfacile registri ĉion, kio nuntempe aperas en Esperanto.

A.- Poste, diveni, kio bone vendiĝos, aŭ kio kontraŭe senutile stagnos sur magazenbretoj, alportante nur la iluzion de titol-riĉeco, jen ne eta respondeco. Kiam abundas akireblaj libroj, la aĉetantoj fariĝas kritikemaj. Kiel normalaj klientoj, ili ne deziras elspezi monon por sensignifaj originalaĵoj aŭ fuŝtradukoj. Tio estas saĝa reflekso, sed kiel konsili ilin?

Cl.- Kiam ni komencis nian laboron antaŭ pli ol dek jaroj, ne tiom abundis la aĉeteblaj libroj, kaj ni mem povis ilin tralegi, por akiri juĝon pri ilia reala valoro. Sed nun eĉ la plej legemaj vendistoj ne povus trovi la tempon ĉion tralegi. Tial pli kaj pli sentiĝas la manko de fida recenza revuo. Eble tiu manko estas pli grava, ol tiu de pure literatura revuo.

A.- Eldonisto, kiu kapablos sin ĉirkaŭi de kompetentaj kritikistoj en la celo lanĉi seriozan recenzan revuon, tiu tutcerte havos abonantaron.

Cl.- Sed ĉu la hodiaŭaj kritikistoj, kiuj, pro manko da loko, kutimiĝis skizi siajn pensojn en kelkliniaj recenzoj, sufiĉe lertiĝis por povi subite nuance prijuĝi aperaĵojn. Niaj recenzistoj, ĝuste pro tiu devo skizi siajn dirojn, fariĝis unuflankaj. Per kelkaj linioj ili anateme kondamnas aŭtoron, kies verkoj tutcerte meritis pli nuancitan juĝon. Aŭ kontraŭe, pro timo ne povi sufiĉe nuancigi sian kritikon, la recenzisto rezignas ĝin esprimi, El tio ni ricevas la impreson de troa laŭdo, kompare al la valoro mem de la pritraktita libro, kaj ni perdas ĉian fidon je la recenzisto.

A.- En nia mondeto la juĝojn de la recenzistoj subjektivigas la reciprokaj amikecoj aŭ malamikecoj. Kelkaj gazetoj, ekzemple, fakiĝis en la kondamnado de ĉio ŝulca, aliaj de ĉio neologismema. Helpe de komparoj inter revuoj el malsamaj tendencoj, ni akiras iom plim objektivan opinion. Ni ĉefe bezonas recenzojn koncerne literaturaĵojn, kies enhavo estas al ni fremda. Kiel juĝi la valoron de poeziaĵo, se pri tiu ĉi beletra fako ni neniel kompetentas. Tio estas nia situacio. Aŭ kiel juĝi pri la valoro kaj fideindeco de esperantigo, kiam oni ne konas la lingvon de la originalaĵo. Persone nur pri esperantigoj el la franca ni povas juĝi. Pri tradukoj el aliaj lingvoj ni devas fidi je la juĝo de la recenzistoj. Kaj pri teknikaj eseoj, kiel decidi pri ilia kvalito, se ne pere de la juĝo de fakulo.

C1.- Ni donu aktualan ekzemplan. La eldonejo Kardo ĵus aperigis elangligon de D-ro Jekyll kaj S-ro Hyde de Robert Louis Stevenson. Temas pri traduko de Albert Goodheir, la nuna sekretario de la Akademio de Esperanto. La iom tro skiza antaŭparolo al la verko ne povis nin multe helpi aprezi la libron, kvankam en ĝi Goodheir resumas la faktan signifon de la romano tiel:

A.- "Stevenson verkis ĝin kiel moralan alegoron. Ĝi pritraktas la lukton inter du elementoj en la homa animo. D-ro Jekyll estas fama kuracisto kaj profesoro, estimata kiel bonfaranto. Li ankaŭ, laŭ sia propra konfeso, estas homo kiu volas indulgi siajn malpli estimatajn dezirojn. Liaj deviaĵoj de respektindeco, en si mem ne tre hontindaj, lasas lin kun malsaneca

hontosento, Ĉar li timas aperi antaŭ la publiko kiel homo malpli ol perfekta. Do li zorge kaŝas sian "duan" vivon. La rakonto temas pri lia provo vivi du vivojn sen malbona konscienco aŭ kulposento, kaj lia fina pereco."

Cl.- Tiu ĉi klarigo por ni ludas plurajn rolojn. Unue ĝi alportas kelkajn klarigojn pri la verko me. Sed antaŭ ĉio ĝi spegulas la originalan stilon de la tradukisto, kaj la malflueco de la antaŭparola teksto vekas ĉe ni certan dubon pri la traduko, kiu sekvas.

A.- Por akiri pli solidan juĝon, ni ne havas multajn rimedojn. Ekzistas nur la recenzoj por nin helpi. Kaj ni bedaŭrinde konstatis, ke tro ofte tiuj, kiujn la UEA-revuo **Esperanto** aperigas, estas iom vendiste moderaj, kiam temas pri libroj, kies aŭtoroj, titoloj tradukistoj aŭ eldonistoj prestiĝas. Tiam la recenzo iel devas instigi al aĉeto.

Cl.- Kelkaj aliaj revuoj fariĝis atentindaj pro siaj recenzoj. Inter ili ni mencias la kvaronjaran DIALOGO, organo de Sarlanda Esperanto-Ligo, kies recenza parto pli kaj pli kreskas, tio ĉi tute prave. Kaj foje tutan paĝon aŭ eĉ pli ĝi dediĉas al kritikita libro, kio jam estas multo en esperantujo.

A.- Koncerne la menciitan elangligon de Albert Goodheir, la recenzo de Fernando de Diego aperas sub la signifa titolo "Stumbla kaj grinca traduko". Jen ni citas kelkajn severajn frazojn de la recenzisto, kiu estas lerta tradukisto:

Cl.- "En sia versio de Kidnapped, Goodheir montriĝis nekapabla tradukinto kaj eĉ ne sperta esperantisto. Nu, la legado de ĉi D-ro Jekyll rivelas, ke de tiam li faris absolute nenian progreson. Lia stilo, rigida kaj sen viva, teniĝas tro sklavece al la originalo, kio ne signifas, ke li respektas ĉiuokaze ties sencon. Ŝajnas, ke al Goodheir mankas la eufonia kaj muzika sento de la frazo. kaj kio en la originalo glate fluas kun natura ritmo, tio stumblas kaj grinças en la traduko..."

A.- Kaj Fernando de Diego poste donas ekzemplojn de Goodheir-aj stumblaĵoj, kaj kio estas pli grava por akademiano, de semantike aŭ morfologie eraraj frazoj.

Cl.- Kelkajn el ili ni estis mem rimarkintaj dum la legado de la libro, ekzemple la ne tre fundamentan uzon de la adjektivoj **sia**, **lia**, **ŝia**, **ĝia** aŭ **ilia**. Jen tipa ekzemplo:

A.- "La egoismo de sia amiko surprizis, tamen senpezigis lin." Oni dvus diri : « La egoismo de lia amiko... » (p. 27)

Cl.- Kvankam mi legis la libron kun certa plezuro, rimarkante de tempo al tempo lingvajn mankojn, kiuj ne devus troviĝi en beletra traduko kaj kiuj ne povas esti pres-eraroj, ĝuste pro la negativa recenzo de Fernando de Diego, mi tendencos ne konsili tiun ĉi libron al aĉetemulo hezitema, des pli ke la recenzo de Diego konkludiĝas tiel: "Ĉi nova traduko de Goodheir rangas kiel mava karikaturo de la originalo kaj propramerite aldoniĝas al la giganta amaso de niaj beletraĵoj (se tiel diri) abortoj."

A.- Ne kuraĝige, ĉu ne? Sed ĉu tute fidiinda juĝo? Ni ŝatus povi mildigi tiun ĉi senapelacian verdikton, des pli ke Fernando de Diego kaj Albert Goodheir verke apartenas al kontraŭaj tendencoj.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond sin esprimis pri la recenzarto. Ĝis reaŭdo!